

STARTO

N-ro 4/2024 (293)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



La asocia konferenco en Česká Třebová
27 - 29 de septembro 2024

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marĉek: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupu@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administraz: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

ĈEA-konferenco en Česká Třebová

de la 27-a ĝis la 29-a de septembro 2024

La konferenco okazis en la junularhejmo Skalka de la teknika kaj trafika mezlernejo Gustav Habrman en Česká Třebová. Partoprenis kvindek da homoj. Kiel gastoj venis Kongresa fako el Slovakio kaj Fejfi, ankaŭ el Slovakio.

La salono kaj manĝejo troviĝis en la teretaĝo, la ĉambroj por tranoktado en la unua etaĝo. Ĉar la junularhejmo estas por knaboj, necesis unu banĉambron kun duŝejoj kaj necesejoj signi kiel virinan. En la salono estis ankaŭ libroservo, en la manĝejo okazis kultura vespero kun muziko kaj tombolo.



Vendrede antaŭvespere alvenis la partoprenantoj, ricevis ŝlosilon de ĉambro, manĝokuponon kaj sakon kun materialoj.

Post vespermanĝo mallonga prelego prezentis la urbon Česká Třebová kaj Esperanto-kolekton en la urba muzeo, sekvis informoj pri UK en Aruŝo kaj prelego kiel ĝuste informi pri Esperanto (P. Chrdle) kaj pri informa funelo (J. Kalčík).

La sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al la ĉefa konferenca traktado: informoj pri la asocia ekonomio, pri agado de la kluboj kaj de la komitato, pri la asocia kongreso en 2025 (verŝajne en Havířov), komuna fotado.



Posttagmeza promeno gvidis nin tra interesaj lokoj en Česká Třebová (parko Javorka, rotondo de sankta Katarina) kaj ĉefe al la urba muzeo, kie magistrino Jitka Petková prezentis al ni la Esperanto-kolekton. Ĉar katalogitaj objektoj apartenas al la ŝtato, neniuj rajtas ilin forigi el la kolekto, kio ofte okazas ĉe bibliotekoj, kiam mankas loko por novaj libroj. Ĉi tiu kolekto servas al esploristoj. Bedaŭrinde la kolekto ne havas publike alireblan liston de libroj, sed kiam oni skribos al s-ino Petková, ŝi respondos, ĉu la libro troviĝas en la kolekto.

Vespero en manĝejo ebligis aŭskulti muzikon, eĉ iomete danci (la tabloj kaj seĝoj estas firme fiksitaj al la planko, la spaco por danci estis limigita) kaj ĝui tombolon.

Dimanĉe antaŭtagmeze estis stiligita la konferenca rezolucio, la gastoj el Slovakio (Dorota Rodzianko, Sofia Zaretskaia, Peter Baláž) priskribis agadon kaj preparojn por UK 2025 en Brno.

Posttagmeze, kiam la partoprenantoj de la konferenco forveturis, kunvenis ankoraŭ Loka Kongresa Komitato por diskuti kun Kongresa Fako, kio estas ankoraŭ farenda.



Magistrino Jitka Petková priskribas la Esperanto-kolekton en la urba muzeo,



pri kiu ŝi preparis malgrandan ekspozicion de la plej interesaj libroj.



Rotondo de sankta Katarina



Ĉe Esperanto-ŝtono



En la muzeo

Usnesení konference

Českého esperantského svazu,
která se konala v České Třebové
od 27. do 29. září 2024

Konference ČES schvaluje:

1. zprávu o činnosti ČES přednesenou předsedou J.Tomečkem;
2. zprávu o hospodaření a členské základně ČES přednesenou pokladní A.Švubovou;
3. zprávu o činnosti klubů přednesenou L.Chaloupkovou.

Konference ČES bere na vědomí:

1. zprávu delegáta UEA P. Chrdleho;
2. pořádání kongresu v Havířově v roce 2025.

Konference ČES vyzývá:

1. členy šířit povědomí o kurzech pro výuku esperanta pořádaných ČES;
2. členy zvyšovat svou jazykovou úroveň;
3. členy zapojit se aktivně do přípravy Světového kongresu esperanta v Brně.

Konference ČES pověřuje výbor:

1. spolupracovat s Kongresovou sekcí UEA na pořádání Světového kongresu esperanta v Brně v roce 2025;
2. pokračovat v jednání o společné akci s GEA v roce 2026;
3. zjistit podmínky pro pořádání hybridních (fyzická a online) setkání;
4. připravit návrh stanov ČES zohledňující možnosti hlasování na hybridních setkáních.

V České Třebové 29. září 2024



Akceptejo de la konferenco



Libroservo malantaŭe en la salono



Manĝejo de la junularhejmo

Kion faras la Komitato

16.9. Reta komitata kunveno dediĉis sin al la venanta asocia konferenco en Česká Třebová (27.-29.9.2024), por certigi, kiu presos nomŝildojn, manĝokuponojn kaj programon, kiel estas prizorgita loĝado, libroservo, la vizito de la urba muzeo kun Esperanto-kolekto, ĉeesta muziko, kion la partoprenantoj ricevos en la sakoj k.s.

28.10. Reta komitata kunveno konstatis, ke estas represita lernolibro *Esperanto přímou metodou* de Stano Marček, kiun bezonas Milan Kolka por la asocia reta kurso. LKK-anoj helpas kompletigi Duan Bultenon por UK Brno 2025, sed definitivon version prilaboros UEA. Estis traktata situacio pri Nacia vespero, proponoj de prelegoj, gvidado de kurso ĉeĥa eksprese, prezento de nialanda instrusistemo.

18.11. Reta kunveno traktis proponojn pri antaŭ- kaj postkongreso de la UK, bonvenigan servon en la Praga flughaveno, prezenton de Brno dum la 5a virtuala kongreso fine de novembro, prezenton de nialanda kulturo, ekzamenojn KER dum la kongreso, helpo al blindaj kaj handikapitaj kongresanoj.

7.12. Ĉeesta kunveno en Svitavy. La asocia kongreso 2025 (kun elekto de nova komitato kaj revizio de Statuto) okazos en Havířov en *Jaškovská krčma* (17. – 19. 10.). Certigo de materialoj per NAS kaj *cloud* kaj transigo de la nuntempa domajno al nova retejo. Libroj de KAVA-PECH, kiujn ĈEA aĉetis, transdonitaj al Libroservo en Svitavy. La urba muzeo en Česká Třebová, kie troviĝas la Esperana librokolekto (iama Ŝustr-biblioteko de la Praga klubo), deziras kompletigi la kolekton per novaj libroj.

Aŭtuna konferenco de Ĉeĥa fervojista E-asocio

Nunjara konferenco de ĈeFEA estis planita en Ramzová, sed pro inundaj damaĝoj oni devis ŝanĝi ne nur lokon, sed ankaŭ daton. La konferenco okazis 25.11-27.11.2024 en montara kabano „Lesní chata“ en Kořenov kun 27 interesiĝantoj. Tuj lunde ni komencis per kurso de Esperanto por progresantoj kaj estrarkunveno de ĈeFEA. Vespere estis prezentitaj raportoj pri agado de nia organizo (L. Hakl), agado kaj laboro de IFEF (L. Kovář) kaj aktivecoj de ĈEA (A. Švubová). Sekvis prelego *Forgesitaj fervojlinioj en Ercmontaro* (L. Hakl) kaj kultura programo de Pavla Dvořáková.

Marde okazis ekskursoj en tri grupoj: 1) dentrela fervojlinio al Dolní Polubný kaj akvofaloj de la rivero Desná. 2) fervoja ponto trans la rivero Jizera. 3) kapelo de Tesařov. Post tagmanĝo prelegoj, *Rekonstruado de stacio Pardubice* (L. Hakl) kaj *Etŝpura greka fervojlinio Ano Lechonia-Melies* (J. Kukla). Poste estis prezentita filmo pri kongreso en Strasburgo kaj resumo de enketo, en kiu respondis partoprenantoj de la kongreso pri siaj vojaĝmanieroj.

Vespera programo komenciĝis per prezentadoj de venontaj aranĝoj kiel UK en Brno (A. Švubová), IFEF kongreso en Žilina. Sinjoro L. Kovář ankaŭ parolis pri estrarkunveno en Mokra Gora, kie okazos IFEF kongreso en la jaro 2026. Lastan prelegon *Laŭ spuroj de L. L. Zamenhof* prezentis P. Dvořáková.

Merkrede post lasta parto de E-kurso ni diskutis pri nia arĥivo, pripensadis eblan programon por fervojistoj por la UK en Brno, aprobis planon por la venonta jaro.

L. Hakl

KAVA-PECH ne plu en Esperanto

Kiel mi jam menciis en Starto pli frue, la jaro 2024 estis la lasta, en kiu KAVA-PECH eldonadis kaj vendadis librojn en Esperanto. En sekvaj jaroj ĝi okupiĝos nur pri la libroj en la ĉeĥa celantaj la ĉeĥan merkaton.

La kialo espereble klaras: miaj aĝo kaj diagnozoj. Ja internacia komerco, eĉ se en ridinde malgrandaj kvantoj, devas fronti al multaj burokrataj obstakloj, dum pri la distribuado de la ĉeĥaj libroj zorgas mia ekskluziva distribuanto Kosmas kaj do mi devas fronti preskaŭ neniujn burokrataĵojn plu, krom la impostdeklaroj kaj devigaj statistikoj.

Mi ĝojas, ke la de mi fondita Esperanto-parto de KAVA-PECH tamen plu ekzistos. Kvankam mi ne trovis daŭriganton en Ĉeĥio, nek en iu EU-lando, ĝi plu funkcios kiel *Les éditions KAVA-PECH* en Montrealo, fondita de François Bolduc. Li ankaŭ transprenis la stokon de miaj ĝis nun eldonitaj libroj, parte ili survojas al li en Montrealon, parte ĝin transprenis lia kunlaborantino en Budapeŝto Stela Besenyei-Merger.



La ĉeĥaj esperantistoj povos plu aĉetadi la ĝis nun eldonitajn Esperanto-librojn de KAVA-PECH kontraŭ ĉeĥaj kronoj, ĉar sufiĉe grandan kvanton aĉetis rabatite Ĉeĥa Esperanto Asocio kaj ili estas aĉetebraj ĉe Esperanto-muzeo en Svitavy aŭ mendeblaj ĉe Marie Čumová, Marie.Cumova@seznam.cz.

Provizore, antaŭ ol la nova eldonejo havos proprajn retpaĝojn, la mendoj de la libroj en Esperanto plu kolektos mia retejo <https://kava-pech.cz/esperanto> kaj mi plusendos ilin al Montrealo kaj Budapeŝto. Sed ĉeĥajn esperantistojn mi petas mendadi tiujn librojn rekte ĉe ĈEA.

Fine mi ĝustigu famojn pri mi, kiuj venis al miaj oreloj:

1e, mi ne kabeiĝas, male mi nun havos pli da tempo por esperantumi,

2e, KAVA-PECH ne bankrotis, nur ne plu agos internacie,

3e, mi ne estas mortanta, danke al Dio kaj kuracistoj mi denove fartas relative bone kaj povas plu ĝui la vivon kaj Esperanton.

Por ke ankaŭ komencantoj komprenu, mi resumas la informon ankaŭ en la ĉeĥa.

Resumé v češtině:

Nakladatelství KAVA-PECH končí s vydáváním i distribucí knih v esperantu, ale našel se pokračovatel, jmenovitě *Les éditions KAVA-PECH* se sídlem v kanadském Montrealu. Čeští esperantisté ale budou moci nadále nakupovat knihy KAVA-PECH za české koruny, a to u Českého esperantského svazu; buď osobně v Muzeu esperanta ve Svitavách, nebo si je objednat na adrese

Marie.Cumova@seznam.cz.

Petr Chrdle,
chrdle@kava-pech.cz

KAEST 2024

7–10 de novembro 2024, Žilina, Slovakio

En hoteleto Galileo en la slovakia urbo Žilina okazis Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko (KAEST) kun 64 homoj el 10 landoj. La temo estis: *Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo*.



En la teretaĝo sub la prelegejo troviĝis manĝejo, kie la partoprenantoj ne nur ricevis tri manĝojn tage, sed okazis tie ankaŭ parto de prelegoj, kelkaj paralele kun tiuj en la prelegejo, do necesis elekti, kiun temon oni preferas.



Ĵaŭde la 7-an de novembro en la prelegejo estis aranĝita libroservo kaj samloke realiĝis prelego de Magdalena Feifičová *Konatiĝu kun Žilina* kaj de Eva Fitzelová kun Johannes Mueller *Festado de jubileo de kern.punkto*. La podkasto *kern.punkto* komencis sian agadon antaŭ 10 jaroj kaj prezentis pli ol 200 epizodojn pri kulturo kaj scienco.



Vendredo proponis jenajn prelegojn: *Robotoj alvenas - aŭtomatigo, artefarita intelekto kaj la minaco de la senlabora estonto* (P. Baláž), *Postkvantuma ĉifrado* (J. Mueller), *Ekde Sumero ĝis James Webb, serĉantaj nian lokon en la kosmo* (K. Spinola).



La prelego pri Sumero en la manĝejo.



Amuzon donis prelegoj de R. G. Fröhlich *La potencialo de etendita realeco XR en edukado kaj lingvo-lernado* kaj *Elprovu Miksitajn Realecon per Meta Quest 2* kun praktika provo. Sub specialaj okulvitroj oni vidis flugantan teleron, el kiu eliris pilkoformaj estaĵoj, kiujn necesis paflikvidi.

La ĉeestantoj povis elekti el aliaj prelegoj: *La Rolo de Esperanto en Solvado de Profundaj Malkonsentoj* (G. E. Guido), *Petro Chrdle kiel aŭtoro kaj tradukanto* (P. Chrdle), *Kiel naskiĝis la ĉefa Vikipedio* (M. Blahuš).



Sekvis *Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo Sapiens* - kiel la *novelo-konkurso* montras kion la ĝenerala publiko pensas pri AI (S. Besenyei-Meyer). *Mapo al la Fina Venko* (M. Matúšov), *Anonco pri la dua KonSciU* (M. Vrazitulis, G. Esposito - konkurso por junaj esploristoj, sciencistoj kaj studentoj), *Plirapidigu la laboron en tabeloj!* (L. Mrkus).



La vespero finiĝis per vingustumado kun kuketoj, fromaĝoj, olivoj.



Sabatan programon malfermis prelego *Kiel oni faras vortaron* (M. Malovec), *Projektoj.org - plibonigu mastrumadon de via organizo* (M. Matúšov) kaj *Artefarita intelekto en sciencaj artikoloj* (M. Nowakovska-Desplantes).

Posttagmeze ni promenis tra Žilina kun ĉiĉerono vestita en historia vesto. Li montris al ni plurajn historiajn konstruaĵojn, ankaŭ modernan grandmagazenon, ĉion ĉirkaŭ la ĉefa placo de Andrej Hlinka. Interpretis Pavol Petrík.




Antaŭvespere ni povis elekti inter *Vojaĝo al Japanio* (M. Desplantes),



Komputilo kiel softvara ricevilo de specialaj radiosignaloj (L. Szilvási),



Konfliktaj identecoj en malkreskanta mondo (K. P. Alonso).



Post la vespermanĝo P. Chrdle prezentis sian koncepton *Kiel informi pri Esperanto* (kaj kiel ne informi).



Dimanĉan programon komencis Ilona Koutny kun Milan Kolka pri *Unika vortara strukturo por lingvolernantoj nun en reta formo*. Sekvis samtempe Jan Baudoin de Courtenay, lingvisto defende por *Esperanto* (B. Pietrzak) kaj *Esperanto-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko* (B. Tuidier). Aliaj samtempaj prelegoj estis *Komparmezura datumaro de germana frazkompreneado* (M. Vrazitulis) kaj *La laboro de Niklaus Wirth en retrospektivo* (R. Hable).



Germana studento kun greka nomo Michael Vrazitulis, komitatano de TEJO, klarigas psikolingvistikajn eksperimentojn kun mensaj procezoj dum kreado kaj perceptado de frazoj.

Posttagmeze Pavol Petrík gvidis por interesatoj ekskurson al kastelo Budatín.

Miroslav Malovec
fotoj el komuna KAEST-fotaro

La mondo scias pri ni!

Kaj ne nur pri Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy, sed ankaŭ pri tio, kiel la klubo laboras, kiel ĝi disvolvas kaj propagandas Esperanton ne nur en sia urbo. Danke al multjara kunlaboro kun signifaj kulturaj institucioj oni scias pri ni ankaŭ en Ĉinio. Regule kaj longtempe ni partoprenas en aranĝoj rilatantaj al evoluigo de reciproka interkompreniĝo, al konkursoj kaj



ekspozicioj servantaj al ekkono de tradicioj kaj kulturo de niaj nacioj. La klubanoj reprezentas per siaj kontribuoj, se eblas eĉ per persona ĉesto, ne nur Esperanton kaj la urbon Svitavy en aranĝoj en

Ĉinio, sed ni organizas ankaŭ komunajn renkontiĝojn, ofte rilataj al „te-kulturo“, ankaŭ por la vasta publiko kaj ni ŝatas fanfaroni ne nur pri nia urbo kaj pri agado de la klubo dum vizito de ĉinaj esperantistoj. Tial Universitato de Scienco kaj Teknologio en Tinjan kune kun Esperanto-asocio en Tinjan, teamo de projekto „Teo, amo kaj mondo“ kaj aliaj institucioj decidis honorigi (kiel la unusolan klubon en Ĉeĥio) per honora titolo „Ambasadoro de teo, amo kaj mondo“ pro tio, kiel oni indikas sur la diplomo, ke „Per taso da teo vi semas pacon kaj amon por pli bela mondo“. Tiu honorigo estas por ni granda devoligo kaj aliflanke rekompenco por la tempo kaj laboro, kiujn ni dediĉas al disvolvo de tiu kunlaboro.

Miroslav Sýkora

La 74-a kongreso de KELI 19. – 26. 7. 2025, Pardubice, Ĉeĥio

Pardubice estas universitata urbo en orienta Bohemio, proksimume 140 km de Brno kaj 100 km de Prago. Ĝi situas 230 m super marnivelo kaj havas pli ol 90 mil loĝantojn. Bone atingebla estas trajne, buse kaj aŭtomobile (parkejo sen-paga ĉe la kongresejo).

La kongreson povas partopreni ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

En la studenta hejmo estas 3-litaj ĉambroj, ĉiam du havas komunan duŝon kaj necesejon (sed vi povas esti sola aŭ du en la ĉambro – necesas alpagi).

Kongresejo: Střední zdravotnická škola, Průmyslová 395.

Aliĝu ĉe: Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio

Telefono : +420 723 672 335

E-mail: polnickypavel@seznam.cz

El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- matenaj kaj vesperaj preĝoj
- interkona kaj adiaŭa vesperoj
- jarkunveno de KELI
- ekumena diservo
- ekskursoj (detaloj pli poste)
- trarigardo de la urbo
- prelegoj, kantado

Pardubice estas historia urbo – unua skriba mencio en la jaro 1295. Ekde la jaro 1560 ĝin posedis la reĝo. En la 19-a jarcento konstruado de fervoj-linio Prago – Pardubice – Olomouc estigis multajn fabrikojn.

GRAVE: ŜANĜO DE LA DATO

DE LA 110-A UK EN BRNO: 26. 7. – 2. 8. 2025



UEA informas, ke pro neatenditaj cirkonstancoj la dato de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) devis esti ŝanĝita. La UK, antaŭe planita por 19-26 julio 2025, nun okazos la sekvan semajnon, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025. La ŝanĝo estis necesa por eviti koincidon kun alia pli granda evento en la regiono de Brno, kio kaŭzus nedisponeblecon de loĝlokoj kaj konsiderindan altigon de ties prezoj dum la kongresa periodo. UEA jam estas en rekta kontakto kun la ĝisnunaj aliĝintoj. Tiu ŝanĝo estas por la plej bona ĝuo de la kongresanoj kaj spegulas la diligentan laboron de la Kongresa Fako de UEA kaj de la Loka

Kongresa Komitato (LKK). Ili sukcesis rapide certigi, ke la evento povos okazi laŭ la plej bonaj kondiĉoj por niaj gastoj laŭ la nova dato.

Pro tiu ŝanĝo la limdato de la unua plej favorpreza aliĝperiodo estis plilongigita ĝis la 15-a de decembro 2024. UEA invitas ĉiujn ankoraŭ nealiĝintajn profiti de la nova limdato, aliĝante ĉe <https://uk.esperanto.net>.

Nuntempe oni pretigas ĉiujn bezonatajn datumojn por la Dua Bulteno, kiu aperos ĝis fino de la jaro. En ĝi haveblos favorprezaj tranoktebloj, samkiel interesaj ekskursoj, inkluzive de la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj.

La dato-ŝanĝo okazis kunlabore kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La 58-a ILEI-Kongreso, planata por okazi en Beogrado, Serbio, nun okazos la semajnon antaŭ la 110-a UK. La teamoj de la 110-a UK kaj de la 58-a ILEI-kongreso devos kunlabori ankaŭ por ebligi bustransportadon de kongresanoj rekte inter la du kongresejoj, de Beogrado ĝis Brno. Pliaj informoj pri la 58-a ILEI-kongreso, kiel la aliĝilo, aperos baldaŭ ĉe <https://www.ilei.info>.

La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto 28 novembro – 1 decembro 2024

Post ĉeesta kongreso en la tanzania Aruŝo okazis ankaŭ kongreso virtuala, alportanta multajn prelegojn, diskutojn kaj kursojn. La kongreson priskribas 6 numeroj de kongresa kuriero, kiuj estas troveblaj ĉe la adreso:

<https://vk.esperanto.net/2024/kuriero/>

Verŝajne post la UK en Brno okazos aŭtune simila kongreso virtuala, jam 6-a. Do, rigardu la 6 numerojn por vidi, ĉu valoras la kongreson spekti.

Eŭropa Tago de Lingvoj

Brno: la 23-an de septembro 2024



la asocio kaj la klubo kaj havis la okazon konatiĝi kun kelkaj bazaj lernolibroj kaj Esperanta literaturo.



Prago: la 26-an de septembro 2024




Kaj la ĉina? Interesan prelegon faris denaska parolanto s-ino Li Huang, membro de nia klubo. Ŝi komencis paroli pri la historio de la lingvo kaj la logiko de la ĉinaj signoj, ilia nuna uzo, instruado... Ŝi parolis ankaŭ pri ĉinaj tradicioj, arto kaj kulturo. La lernantoj ankaŭ havis la okazon gustumi ĵus preparitan veran ĉinan teon.

Svitavy: la 23-an kaj 24-an de septembro 2024

Ĉi-jare la elementa lernejo en la strato Riegrova konceptis la lingvotagon netradicie. Nek la germana, nek la angla, sed danke al vasta kaj disvolviĝanta kunlaboro inter la lernejo kaj nia Klubo de Esperanto-Amikaro en Svitavy ni preparis du netradiciajn lingvojn – **Esperanton kaj la ĉinan.**

La prezidanto de la Klubo, s-ino Dvořáková, parolis pri historio kaj origino de Esperanto, gramatiko kaj vortfarado, la lernantoj ankaŭ lernis ion pri la agado de



Ankaŭ la studentoj de loka gimnazio eksciis pri kunlaboro de esperantistoj en la tuta mondo, ekz. pri Pasporta Servo. Pri la ĉina ili informiĝis, ke ne ekzistas unu ĉina lingvo, sed multaj dialektoj.

Miroslav Sýkora

Eŭropa tago de lingvoj en Prago

Leonarda Chaloupková

Fine de septembro organizis praga Universitato de Karolo Eŭropan tagon de lingvoj. En centro de Prago, en „Kampuso Hybernská“, en granda salono, ariĝis multaj personoj, precipe junaj, kiuj emis prezenti lingvon de sia hejmlando. De la organizantoj oni ricevis belajn T-ĉemizojn.



Ni du esperantistoj elektis verdajn. Sur unu, de ni elektitan tablon, ni metis diversajn E materialojn kaj de la 15-a ĝis 18-a horo ni prezentis nian Esperanton. Komence venis niaj konatulinaj Vlasta kaj Mirka kaj nur pli poste ekvenadis multaj aliaj, plejparte junaj homoj. Evidentiĝis, ke ĉiuj jam regas ian fremdan lingvon, unu aŭ eĉ pli da ili. –


Jozefo alparolis la homojn esperantlingve per simplaj frazoj kaj ili, preskaŭ senerare, en Esperanto respondis! Mirinde! Fakte estas, ke pri nia E tablo, pri nia Esperanto, estis granda intereso, eĉ de fotografoj. Fine de la aranĝo iu redaktoro petis Jozefon pri intervjuo. Bedaŭrinde nek la fotojn, nek la intervjuon ni ie vidis.

Promeno al „kongresaj lokoj“

Komence de novembro du esperantistinoj de E-klubo en Benešov vizitis kongresan urbon Brno por ekkoni lokojn, kie efektiviĝos diversaj aranĝoj de la UK.



Oferema ĉiĉerono Olda montris al ili la burĝon Špilberk, lokon de Nacia vespero, teatron Janáček, sur kies antaŭplaco okazos malfermo kaj fermo de la UK kaj la kongresejo – Mendel-universitato. La universitato estas granda, bela, impona konstruaĵo. Do, ĉi tie okazos ĉiuj prelegoj, amuzaj programoj, teatraĵoj, koncertoj ktp.



Krom tiuj ĉi lokoj la vizitantinoj vidis malnovurban domon kun fama drako de Brno kaj ankaŭ konatan radon, vilaon Tugendhat kaj aliajn interesajn vidindaĵojn de la urbo. Tagmanĝon ili entreprenis en gustohava vegetarana restoracio REBIO, situanta en aĉetcentro Velký špalíček – Granda ŝtipeto. La vizito finiĝis en agrabla kafejo.

Leonarda Chaloupková

Nacia Tago de Fervojo en Česká Třebová

19 – 20 de oktobro 2024

Temas pri granda prezentado de historio, nuntempo kaj estonto de fervojo en la lando. Por vaporlokomotivoj, kiuj alveturis en granda nombro, tio estis ne nur festo, sed ankaŭ adiaŭo kun la ĉefaj fervojlinioj, ĉar de la jaro 2025 ili ne povos veturi tie pro sistemo ETCS.



El diversaj urboj veturis al Ĉ. Třebová vaportrajnoj. Krom tio partoprenis lokomotivoj de diversaj epokoj kaj ankaŭ novaj trajnoj, vagonoj ktp. Ne mankis fervojo miniatura. Programo estis plena kaj favorantoj de fervojo travivis belan tagon.



Kiel kutime, ni partoprenis kun nia Esperanta tablo, kie ni prezentis nian agadon al publiko kaj al esperantistoj, kiuj vizitis nin.

Ni disdonis multajn materialojn, inkluzive de instruaj, kelkaj vizitantoj elpetis kontakton.



Jan Kovář ĉe la Esperanto tablo



Ladislav Hakl informas scivolemulojn



Ladislav Hakl

Esperantistoj el Svitavy denove en la mondo

Esperanto kreas spacon por proksimiĝado de homoj en la tuta mondo. Ĝi ne estas nur lingvo, kiu helpas nin interkompreniĝi kaj kontentigi nian intereson kaj scivolemon pri kulturo, historio kaj vivo en aliaj landoj de la mondo. Esperanto kunigas homojn, kiuj ekzemple hieraŭ ankoraŭ ne konis unu la alian kaj tuj poste ili travivas la tutan posttagmezon en amika interparolado.



La ĉi-jara eksterlanda ekspedicio de klubanoj el Esperanto-muzeo en Svitavy direktis sin al la dua plej granda aŭstria urbo Graz. Graz estas antikva historia urbo ĉe la rivero Mur, kiu estis en la tempo de nia vizito post nelongaj inundoj disverŝita kaj sovaĝa. Super la rivero turas fortikaĵo kun burgo Schlossberg. Supreniro estis por ni iom klopoda. Sed ni legis, ke ni ne estis solaj, tiu fortikaĵo apartenas al la malplej konkerataj lokoj en Aŭstrio. Vidi la panoramon de urbo kun tricent mil

loĝantoj estis belega rekompenco, kiu valoris la penon.



Esperantistoj en Graz apartenas al plej malnovaj grupoj en Aŭstrio. En la jaro 1893 formiĝis Esperanto-grupo en la urbo Leoben. Komencoj de Esperantomovado atingas ĝis la jaro 1906 kaj regulajn kunvenojn de grupo Esperanto-Gesellschaft Steiermark povas viziti ne nur esperantistoj. Kiel pruvo de estimo al homoj kaj lingvo Esperanto estis unu placo en Graz nomita okaze de centjariĝo de tiu lingvo kiel Esperanto-Platz.

Trovi la placon ne estis komplike. Post alveno trajne al Graz el Česká Třebová ni iris tra la ĉefa avenuo kaj maldekstre ni vidis statuon dediĉitan al Esperanto. Krom statuo kun surskriboj esperantlingvaj estas sur la placo tabuloj, kiuj klarigas la signifon de la vorto Esperanto



ĉeĥa reĝo Ferdinando la 2-a, kies tombon ni vizitis kaj rememoris la gravecon de tiu ĉi persono por la ĉeĥaj landoj lige kun la Tridekjara Milito kaj la vivo de Jan Amos Komenský (Komenio).

Jan Richt

kaj mallongan biografion de kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Trie kaptis nian atenton sur la placo granda surskribo restoracio Esperanto. Interalie ĝuste ĉi tie eblas trovi kaŝitan geokaŝujon, kiun ne estas facile ĉasi kaj akiri poenton por la ludo geokaŝado.



La tri tagoj pasigitaj en Graz forflugis tre rapide. Vesperaj promenoj, riĉa kulturvivo, merkato kun historiaj aĵoj sur la placo, restoracioj „sur la akvo“, historiaj domoj kun malgrandaj butikoj, kiuj invitas vin gustumi stiriajn bongustaĵojn kaj ĉio ĉi estis aranĝita en mirinda suna aŭtuna semajnfino.

Graz havas historian ligon kun la ĉeĥaj landoj. Ĉi tie estas enterigita interalie la



Post 10jara paŭzo
ni elkore denove invitas vin al

SABLA PRINTEMPO
en Písek sabate 5.4.2025
inter 10:30 kaj 17:00

*„Roloj kaj formoj
de la Esperanta librokulturo
en la 21-a jarcento“*



Atendas vin:

- literatura programo
en la Urba Biblioteko
- komuna tagmanĝo
- eta urbopromeno surspure
de Fráňa Šrámek
- mallongaj prezentoj pri interesaj libroj
klasikaj, elektronikaj, pri sonlibroj kaj
pri projektoj por subteno de legado
- kantado de muzikigita poezio

Kontribuo por organizaj elspezoj
100,- CZK.

Posttagmeza refreŝiĝo senpaga.
Tagmanĝon ĉiu pagos memstare.

Por detaloj interesatoj bv. skribi
kaj aliĝi ĝis 28.3.2025
ĉe pisek@esperanto.cz.

Nome de la EK „La Ponto“ antaŭĝojas
vin

Pavla Dvořáková.

Esperanto-arboj

Esperanto-arbo Jeseník 1990

En la parko de la banurba domo
Priessnitz estis plantitaj du arboj,
piceo kaj pinio, de la loka Esperanto-
grupo kun la klubo el Šumperk.



Koncize

■ La 1-an de oktobro 2024 estiĝis **nova rondeto en Prostějov**, fondintoj estas Jiřina Budínová, Jitka Hanáková, Jiří Kinel kaj Jaroslav Uhlík.

■ Jindřiška Drahotová akiris trian premion en **internacia literatura konkurso Hristo Gorov** por *Miaj akvaj rememoroj*.

■ En la aŭtuna numero de bibliotekista gazeto **Duha** (Ĉielarko) aperis artikolo de M. Malovec *Esperanto v Moravské zemské knihovně* (Esperanto en Moravia Landa Biblioteko).

■ La **Jutuba kanalo** pri interlingvistiko <http://www.youtube.com/@CEDInterlingvistiko> enhavas interesajn prelegojn de kompetentaj lingvistoj pri esperantologio.

■ **Hispana Universitato aktivas plue**. Komenciĝas la lernojaro 2024-2025, sed neesperantistoj volantaj distance lerni Esperanton por ricevi universitatan diplomon pri ĝi, kien sin turnu? Nur UNED (Hispana Nacia Distanc-Eduka Universitato) ebligas studi nian lingvon distance, per interkonsento kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF). UNED estis fondita en 1972 kiel publika distanca universitato komparebla al la brita *Open University*, kaj fariĝis la plej granda hispana universitato, kun pli ol 150 000 studentoj la pasintan jaron.

■ **Fino de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano**. La Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) estis fonditaj en 1997, kaj la unua grupo startis en 1998. La 9-11-an de septembro 2024, post 26 jaroj da funkciado, la oka trijara studgrupo trapasis sian lastan ekzamenon.

■ **La 38a Arkones, la lasta**. La long-tradicia semajnfina renkontiĝo Arkones okazis la 38an fojon la 13-15an de septembro en Poznano. Du muzikaj vesperoj, tagaj prelegoj pri literaturo, pri esperanta-traduko de ĉina klasikaĵo Ruĝdoma sonĝo, pri vjetnamaj manĝoj, teatraĵoj, filmetoj.

■ **La 58-a BET okazis en Tartu**, universitata Estonia urbo, la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo 2024. Partoprenis 55 esperantistoj el 13 landoj. Estis prezentitaj prelegoj pri historio de la Esperanto-Movado en Estonio, pri rolo de marĉoj en la vivo de naturo kaj de homaro, pri tradukado kaj subtilaĵoj de tradukista laboro, pri Lesja Ukrainka, pri historio de Ukrainio, pri Latvaj Esperanto jubileoj en 2024, pri Nepala Himalaja renkontiĝo. Sabato estis ekskursita tago, al la impona Estonia Nacia Muzeo.

■ **Esperanto-kurso por hispanparolantoj**. Ekde 2020, seninterrompe, UEA kaj Kolombia Esperanto-Ligo ĉefkunlaboras por ĉiujare okazigi retajn Esperanto-kursojn por hispanparolantoj. Al tiu agado entute ĝis nun aliĝis **pli ol 2000 lernintoj el 29 landoj** en la lastaj jaroj. La kursoj estas senpagaj kaj celas kaj komencantojn kaj progresantojn. Ĉiu lernanto havas aliron al vasta materialo, parolsesioj, lerniloj kaj virtualaj lecionoj gvidataj de spertaj esperantistoj. En 2024 jam aliĝis pli ol tricent personoj, la kurso okazis de la 2a de oktobro ĝis la 23a de novembro.

■ En broŝuro **Elekti la ĝustan prepozicion** la aŭtoro Evgeni Georgiev kolektis la plej gravajn verbojn kun iliaj kutimaj prepozicioj, ekzemple:


adiaŭ/i vt, vn (-n, al) saluti iun, kiu foriras: *la dommastro ~is la gastojn (al la gastoj)*.

Franz Kafka – fama kontraŭ (malgraŭ) sia volo

Eseo

„Fama“: pro siaj verkoj kaj sia vivo...

„Malgraŭ sia volo“: literatura historio estas dankema al Max Brod (la plej proksima amiko de F.K.), ke li ne plenumis la lastan volon de sia amiko: bruligi ĉiun postlasitan skribmaterialon de li...



Kafka estas fama en la tuta mondo, kaj ni – liaj „sampraganoj“ kaj „samcivitanoj“ skribas jenan memoron en la jubilea 100-jariĝo post lia morto: la 3a de junio 1924.

Pri Franz Kafka estis skribita amaso da skribaĵoj en la celo lin kompreni. Nia artikolo ne estas ia analizo de liaj verkoj (laŭvere ĝuste tia literatura flanko estas la plej interesa). Ni volas ekkompreni lin almenaŭ iom, kiel la homon „el karno kaj ostoj“; kvankam laŭvere dirite, li aspektis kaj vivis kiel la estaĵo etera.

Okaze de la ĉi-jara rememoro estis eldonita libro „Kun Franz Kafka vojaĝe“ (de la aŭtoroj: Judita Matyášová-teksto/Jan Jindra-fotoj). El ĝi ni ekscias, ke Kafka „ĝis-vojaĝis“ (pli trafe finvojaĝis, finpilgrimis) en sia reala vivo, **en la dr. Hoffmann-sanatorio en Kierling, proksime de Vieno (Aŭstrio).**

La aŭtoroj trovis 67 lokojn, kie F.K. estadis. Ne, ni ne mencias ĉiujn, kelkaj troviĝas eksterlande. Sed multaj estas tute proksime – do rekte en Prago. Nur en sia naskiĝurbo estadis F.K. sur 21 lokoj! Sed ne pro tio, ke li estus ia „praga pilgrimanto“ (kiel V. Nezval), kiu volus profunde trarigardi jenan urbon, kies magio estis konata eĉ post la limoj de nia lando; ĝi allogis precipe la

verkistojn germanajn. Kelkajn el ili konis F. K. persone, kaj ties verkaĵoj estis tage – vespere traktataj en diversaj kafejoj – menciendas la plej fama ARCO – kie Kafka „kafumis“ kun siaj amikoj.

Kial li tiom „migradis“ en la urbo? La unusola kialo estis serĉado de la loko, kie li havus je dispono plenan trankvilon, kie li povus senrompe verki. Post longa tuttaga okupiĝo en laboro (10-12 horoj) kaj post la vespera renkontiĝo kun amikoj li havis nur unusolan deziron („celo de lia vivo“) – en kvieto sidi ĉe tablo kaj skribi. Meti sur la paperon ĉiujn ideojn kaj emociojn, kiuj amasiĝis en lia animo.

Jen ni demandu: ĉu tian lokon li trovis en Prago? Ni scias, ke ne...

Nian artikolon ni direktos iom „patriotece“ ...

Ne, ke Kafka mem ian patriotecon sentis... nek ĉeĥan, nek germanan... estis li nek ĉeĥo nek germano; li estis judo... La juda kulturo en Prago esprimiĝis pere de la germana lingvo (eble ankaŭ en jidiŝ: kiam en Prago gastis juda teatra grupo el Pollando). La menciita praga medio al Franz kaj al liaj amikoj sufiĉis, pri la ĉeĥa elemento („ĉeĥeco“) ili ne interesiĝis, ili restis indiferentaj... Direndas, ke ankaŭ la lokoj ekster Prago, kiujn Kafka travojaĝis (ĉu tiujn industriajn, ĉu tiujn por saniĝi) estis germanaj (eĉ judaj). Kvankam iliaj nomoj sonas ĉeĥe!!

Nun ek al la „pilgrimado“, ke ne preteriru nin „avidaj turistoj“ celantaj al la Kafka-memorlokoj.

PRAGAJ

Náměstí Franze Kafky, nr. 24

Kie je la 3a de julio 1883 naskiĝis „gracila, sed sana infano...“. Gracila (svelta) li restis la tutan vivon... sana – ne...

Dům u minuty, Staroměstské náměstí, nr. 2

De kie eliris la juna knabo, je la 1-a de septembro 1889, en sia unua lernejtago al lernejo, kiu troviĝis en la strato Masná. Kia antaŭdestino – kiel li tenis la manon de hejmkuiristino, kiu lin akompanis – kaj sentis grandan angoron. Kiu restis en li kiel dominanta senco la tutan vivon!

Ni ne povas ne mencii la dominanton sur Staroměstské náměstí:

Palác Kinských (la palaco de la nobelgento Kinský).

Estis en ĝi galanteria komerc-grandvendejo de lia patro Herrman K., kaj la germana gimnazio, kiun Franz vizitadis.

Ovocný trh, nr.3

Tie troviĝis la Karlo-Ferdinando-Universitato (nun KARLO-U.), kie Franz ricevis la gradon de jurist-doktoro, en 1906.

Asekurejo GENERALI, („Assicurazioni Generali“ italia)

Václavské náměstí, nr. 19

En kiu la laboro prenis multe da taghoroj, kiujn Kafka bezonis por sia „hobio“, tial li ŝanĝis la okupon kaj fariĝis jurista kontrolisto, en simila instituto: Dělnická úrazová pojišťovna pro Království české (*Laborista asekurejo por la Ĉeĥa reĝlando*). Tiu troviĝis **Na Poříčí, nr. 9.**

En nordaj regionoj de nia lando tiam disvolviĝis multfaka industria progreso. Kreskis tie multaj fabrikoj, en kiuj

okazadis multaj labor-akcidentoj, ĉar oni ne respektis (eĉ eble ne havis) la regulojn por prizorgi higienon kaj okup-danĝeron. Kafka do fariĝas kaj instruisto por la reguloj, kaj kontrolisto de ili. Sed li ne estas nur „rigora oficisto“ – lin kaptas eĉ tekniko kaj teknologio, li mem proponas kelkajn plibonigaĵojn.

Antaŭ ol ekvojaĝi al la menciitaj lokoj, ni haltu en la loko plej fama: **Zlatá ulička, nr. 22, sur Hradčany (Praga burgo).**

La ĉambreton en unu dometo luis por si lia fratino Ottla, kaj ŝi ebligis al Franz post laboro esti tie kaj verki. „Mi restas tie plej ofte ĝis noktomezo. Poste la iro hejmen. El la dometo rekten sur la neĝon de la silenta strato...“

EKSTERPRAGAJ

Vratislavice:

fama tapiŝo-fabriko de Ignaz Ginzkey – la tapiŝoj de tie vojaĝis eĉ en Metropolitanan operdomon en New York.

Jablonec nad Nisou:

tie li havis instrukt-lecionojn por entreprenistoj kiel eviti akcidentojn en siaj fabrikoj kaj laborejoj, kaj same li instruis principojn pri asekurado de laboristoj.

Frýdlant:

Lia fratino Ottla vizitis tie agrokulturan lernejon, por ke ŝi fake mastrumu la familian farmon en Siřem (post kiam la virposedanto, parenco, devis militservi).

Siřem:

Tien, al la fratino, Franz ekvojaĝis en la espero, ke la kampara aero kaj medio helpas eviti la tuberkulozon, kiu ĝuste estis malkovrita. Li restis tie 8 monatojn (1917-1918), kaj estis tio la tempo verkodona: tie li skribis la (malbon)-faman 100-paĝan *Letero al la patro*.

(La patro ĝin neniam legis). Kaj tie-ĉi li ekkomencis skribi sian faman verkon „KASTELO“.

Ĉi tie ankaŭ okazis la neforigebla disiĝo de Franz kaj lia fianĉino Felice. Kiu faris 30-horan vojaĝon el Berlin... Li devis fari al ŝi grandan kordoloron kaj malhonorigon. Laŭŝajne la kialo estis lia grava malsano, li ne volis esti malrespondeculo por alia persono... (Kiel montriĝas el lia biografio, tio estis vere nur „laŭŝajno“).

Dialogo en 28-a de septembro 1917:

Franz: Do, ĝis tie mi troviĝis.

Felice: Do, ĝis tie mi troviĝas.

Franz: Ĝis tie mi igis vin troviĝi.

Felice: Tio estas vero...

Turnov:

Rande de la urbo estas granda hortikultura paradizo. La ĝardenoj de Mašek estas konataj eĉ post la limoj de Eŭropo. La firmao liveris la kreskaĵojn kaj vegetan materialon en Egiptujon, Persion kaj Aŭstralion. Estas ĉi tie multo da varmigitaĵoj, dekmiloj da diversaj palmo-arboj kaj orhideoj. Kafka tien alvenis en la septembro 1918. Denove li serĉas loĝejon laŭ du kriterioj: kvieta loko kaj eminenta manĝaĵo: kompreneble senvianda. Bedaŭrinde, li ne sukcesis. „Avantaĝo de hotelo: perfekta mastrumado, granda pureco, videble eminenta manĝaĵo.“

Malakceptaĵoj: nurnure vianda manĝaĵo (kvankam plenkvalita), kaj ovoĵoj. Io alia – nur rare kaj escepte. La vegetaĵaron ricevi – tute ne eblas... Tamen unu bonaĵo: famaj turnovaj pomoj kaj piroj.“ (el letero al la amiko Max Brod).

Promeni en tiu ĉi „paradizo“ estis por Kafka vera ĝuo. Ni scias, ke en siaj junaj jaroj li volis esti ĝi hortikulturisto profesia; li veturadis en la Botanikan

ĝardenon en Praha-Troja, kie li frekventis la hortikulturan kurson.

PORSANIGAJ VOJAĜOJ

- ni substreku, ke la menciitaj lokoj estis jam en si mem paŝoj kaj streboj por plibonigi la sanstaton. Ĝis tiam ne havis Kafka problemojn, li eĉ ŝatis certan sportadon (ekz. naĝadon). En sia okupejo li ricevis rajton por la bezona malĉeesto. La speciala loko por resanigado estis la penzono Stüdl en la ĉeĥa **komunumo Želízy**.

(Citaĵo el antaŭe menciita libro S Kafkou na cestách:

„Preskaŭ fino de la jaro, malfrua novembro kaj ĉio estas ia malgranda finkalkulado... Kafka sentas sin certa, ĉar li estas malproksime de ĉio, kio koncernas Pragon; li daŭrigas sian longegan lamenton.

Dopis otci (Letero al la patro) - La multpaĝan verkon (fontoj: 100-paĝa), en kiu li esprimas sian koncernon al la patro, li neniam forsendis, la patro ĝin ne legis (nur la patrino – post la morto de F.K. ... M.T.).

Kiam li ne skribas, li babiladas kun la juna judino Julie Wohryzková, kun kiu li tuj fianĉiĝas.“ Kaj denove li ekkomplikas sian vivon...

INTERMEZO PRI LA AMO

Ni ne povas jenan temon eviti, se ni volas almenaŭ iom kompreni la „malkompreneblan“ Kafka-n. Jen Kafka – la „asketa tipo“, al kiu 1/preteriris amo? Aŭ – kiu li, memvole, 2/ lasis la amon preterpasi?

Vera estas la punkto 2! Kun kelka surprizo ni legas, ke ĉe siaj vojaĝoj (kun Max kaj Otto Brod), ili vizitis la domojn por tiaj kialoj destinitaj.

Kaj ke ankaŭ en sanatorioj travivis Kafka erotikajn aventurojn. Ne – impotenta li ne estis. Pri tio ja prizorgis jam en la juneco lia patro Herrmann, kiu lin en la publikan domon alĝvidis.

Surprize estas, kiomfoje kaj kiel facile Kafka enamiĝis... Kaj kiel malfacile li de tiu „ŝarĝo“ sin liberigis... Da tiaj am-kontaktoj li havis pli multe, ol iu „normala viro“, kiu amas nur unufoje en la vivo. Kiu antagonismo en li mem malebligis, (substrekendas, ke pli frue, ol li eksciis pri sia malsano), la ordinaran homan travivaĵon??... Li konsciiĝis, ke li ne estas taŭga por la familia vivo; ke li ne estas respondece forta samtempe plenumi postulojn de anima kaj korpa amkontaktoj de la amata virino (aŭ pli trafe amanta virino?): Tial ĉiuj liaj am-amikinoj devis travivi la amaran senton de malfeliĉo kaj malhonorigo, kiun al ili kaŭzis la karulo. La kunvivo intelektuala eble?? estus ebla. Sed la korpa, fizika amo estis al li „naŭza“ kaj „malpura“... Komprenu, kiu kapablas...!

Špindlerůn Mlýn – Bedřichov nr.23

La jaro 1922. En jena montara, alneĝigita loko Kafka esperas kaj deziras plibonigi sian sanstaton. Tie li daŭrigas verki sian romanon Kastelo, kaj finfine trovas la taŭgan nomon por la protagonisto.

Li mem: „Sur la tablo de hotelgastoj troviĝas dufoje mia nomo (kiun mi evidentigis ĝuste) en jena formo: **JOSEF K.**“ Ĉu providenco??

En la absurda kaj malkomprenebla anima, korpa stato finiĝis la angorplena vivo de nia martiro. Tio okazis je la 3a de junio 1924, do li apartenas al 100-jariĝaj jubilantoj de la jaro 2024.

Per la jena rememoro ne finiĝu nia intereso pri nia „samurbano“ kaj „kuncivitano“. Al la juda tombejo en Strašnice ne estas longa vojo...

Oktobro 2024 Margit Turková

Rimarkigo de la redaktoro:

■ En la Praga UK 1996 prelegis Mauro Nervi pri **Kafka en Prago. Kiel oni vivas en kaĝo sen kradoj**. Li ankaŭ esperantigis rakonton de Kafka **La metamorfozo**, kiun tradukis ankaŭ Reindhard Haupenthal kaj Vilhelmo Lutermano (tiu en libro **Sonĝo kaj aliaj rakontoj** sub titolo **La transformiĝo**). Romanon **La proceso** esperantigis Dorothea Kaiser kaj Hans-Georg Kaiser (elŝutebla el la reto karapaco.de).

■ En Poděbrady oni fieras pri angula domo ĉe la placo de Georgo de Poděbrady, kie loĝis la avino de Franz Kafka kaj naskiĝis patrino de la verkisto. Nun tie estas lia busto sur la muro.

■ Ekzistas eldonejo Franz Kafka, kiu en la jaro 2007 aperigis romanon de 13-jara Petr Ginz *Návštěva z pravěku* (Vizito el prahistorio). La romano estas unu el trovitaj verkoj de tiu talenta knabo, kiu pereis en Aŭŝvico.



Aprezo al esperantistoj

Opava. Kvankam Opava estis fondita iam en la dua jardeko de 13-a jarcento (la unua mencio rilatas al gastejo ĉe la rivervadejo el la jaro 1202), la urbo festas sian okcentjariĝon ĉi-jare lige kun kelkaj urbo-rajtoj, kiujn al Opava dokumenteble donis la ĉeĥa reĝo Otakar la I-a en la jaro 1224. La oficialaj festoj okazas dum la tuta jaro. La jubileo pintiĝis fine de septembro, kiam en la Silezia teatro la urbestro honorigis tridekon da eminentaj urbologantoj por meritoj. Etis inter ili ankaŭ **Inĝ. Vlastimil Kočvara**, kiu ricevis **Premion de la urbo Opava**. Estis aprezita lia kontribuo al kultura vivo de la urbo kaj al ĝia prestiĝo samkiel diskonigo de verkaro de P. Bezruč pere de Esperanto. Estis ankaŭ menciita lia grava rolo kiel prezidanto de organiza komitato de la 81-a UK en Praha, kiu estis unu el la plej grandaj kongresoj en la Esperanto-movado ĝenerale kaj ankaŭ en Kultura palaco en Praha mem.



Martin. Ankaŭ la slovaka urbo Martin aprezis la tutvivan profesian kaj aktivan laboron en instruado de Esperanto enlande kaj eksterlande, en eldonado kaj redaktado de esperantlingvaj publikaĵoj kaj gazetoj per **Premio de la urbo Martin**, kiun la urbestro Ján Danko transdonis solene al **Stanislav Marček**, en Nacia Domo de Slovaka Ĉambra Teatro en Martin. La honorigon ricevis ankaŭ aliaj samurbanoj, ĉeestis magistratanoj, deputitoj, delegitoj de ĝemelurboj kaj la publiko.



Ni rememoras

Ĉi-jare ni rememoras datrevenojn de naskiĝo aŭ forpaso de pluraj gravaj esperantistoj, ne nur niaj.

NASKIĜOJ:

Marie Hankel (1844-1929)
Henri Vallienne (1854-1908)
Heinrich August Luyken (1864-1947)
Julie Šupichová (1884-1970)
Montagu Butler (1884-1970)
Petro Stojan (1884-1961)
Anna Bárochová (1894-1975)
Raymond Schwartz (1894-1973)
Theodor Kilian (1894-1978)
Bakin (1904-2005)
Jevgenij Bokarjov (1904-1971)
Josef Vondroušek (1904-1995)
Vilibald Scheiber (1904-1974)
Juan Régulo Pérez (1914-1993)
Marjorie Boulton (1924-2017)
William Auld (1924-2006)
Josef Hradil (1924-2008)
Ignat Bociort (1924-2015)
István Szerdahelyi (1924-1987)
Pavel Sittauer (1934-2018)
Stanislava Chrdlová (1954-2000)

FORPASOJ:

Rudolf Hromada (1890-1964)
Sándor Szathmári (1897-1974)
Reto Rossetti (1909-1994)
Adolf Staňura (1915-2004)
Adolf Burkhardt (1929-2004)
Zdeněk Hršel (1928-2014)
Miloslav Pastrňák (1919-2014)
Geraldo Mattos (1931-2014)



Antaŭ 70 jaroj en Montevideo UNESCO akceptis favoran rezolucion pri Esperanto

La 10-a de decembro 2024 estas grava tago por Esperanto, ĉar ĝi markos la 70-an datrevenon de la Rezolucio de Montevideo, la unua kaj plej signifa oficiala agnosko de Esperanto fare de Unesko.



Unu el la rezultoj de tiu agnosko estas aperigado de Unesko-kuriero en Esperanto. La lasta nun elŝutebla el la retejo de UEA havas temon **Konstrui por estonteco** pri bambuaj domoj, tegmentitaj ĝardenoj kaj aliaj temoj.

Togolando kulture

estas libreto de afrika samideano Kokou Sagbadjelou, kiu vizitis nian UK 1996 en Prago kaj poste gastis ĉe familio Hršel.



Ĝuste Zdeněk Hršel (1928-2014) venis kun ideo prezenti esperantlingve togolandajn fabelojn, proverbojn, koncize kulturon, sed ni sukcesis realigi la ideon nur 10 jarojn post lia forpaso. En la libro estas ankaŭ lia medaliono. La libron ilustris 30-jara togolanda artisto Patasé Sévérin Pakoui, eldonis klubanoj de Brno.

Ĉu vi konas Esperantajn retransdiojn?

Se vi volas renkontiĝi kun eksterlandaj esperantistoj dum nia UK en Brno, ni rekomendas trejni la lingvon per aŭskultado.



Eble la plej konata estas **Pola Retradio**, kiu daŭrigas laboron de iama Pola Radio. Sed tiam vi devis atendi ĝis noktomezo por rekte aŭskulti kelkminutan elsendon, nun vi povas aŭskulti kiam ajn kaj eĉ elŝuti la programojn al via komputilo. Ĉefa redaktoro estas Barbara Pietrzak.

[Pola Retradio](http://aldone.de/retradio)

esperanta retradio			
http://aldone.de/retradio			
Propraj produktaĵoj de la Esperanta Retradio			
Programado kun muzika interludo	Atento: La novaĵ sonaristikoj estas enkondukitaj ekde la 8:00 MET (7:00 UTS) de la koncerta tago. Atentu la tagojn!		
Esperanta Retradio	Vidu la programiston kun bildoj de Blossom		
Esperanto	Novembro 2024		
 Skribu al retradio@aldone.de	Paŭlo S. Viana: Malpli da legantoj en Brazilo	26-11-2024	05:21
	Anton Oberndorfer: Aŭskultu kaj ripetu - porco 27	25-11-2024	05:51
	Luiza Carol: Sonita el ruboj (unua el 2)	24-11-2024	08:17
	Anton Oberndorfer: Necese kaj eble redukti platan rubaĵon	23-11-2024	05:23
	Paŭlo S. Viana: Ĉu komputila programo povas esti speco de kuracisto?	22-11-2024	04:30
	Anton Oberndorfer: Grasoĉaj "memoroj" pri tropezo	21-11-2024	06:35
	Aaron Chapman: La punktoj kaj strekoj de Moriso	20-11-2024	03:10
	Paŭlo S. Viana: Nikita luno povas damaĝi la sanon	19-11-2024	04:21
	Anton Oberndorfer: Aŭskultu kaj ripetu - porco 26	18-11-2024	05:31
	Luiza Carol: La heliko kaj la lacerito	17-11-2024	12:14
Anton Oberndorfer: Kolomboj en la			

Esperanta retradio ekzistas danke al Anton Oberndorfer, kiu en la jaro 2016 vizitis nian asocian konferencon en Pelhřimov kaj prezentis sian projekton. Unu el liaj kontribuantoj estas nia Jaroslava Malá.

[Esperanta Retradio](http://aldone.de/retradio)

59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

La 5an — 13an de julio 2025 (Kaunas, Litovio)

Por logi vin al partopreno, ni intervjuis Radmila Švejcarová pri ĉi-jara BET

Vi partoprenis ĉi-jare BET. Kio estas BET kaj ĉu tio estas via unua sperto?

BET signifas Baltiaj Esperantaj Tagoj (origine Baltiaj Esperantaj Tendaroj), ĉar ĉiam ŝanĝiĝas tri baltiaj landoj – Latvio, Estonio kaj Litovio. BET daŭras unu semajnon, nur en Estonio malpli longe, ĉar en malgranda lando estas malmulte da esperantistoj, kiuj ne havas fortojn prepari programon por la tuta semajno. Mi vizitis BET du-foje – pasintjare en Latvio kaj ĉi-jare en Estonio.

Kia estas Estonio kaj Esperanta aranĝo en ĝi? Estas nur iomete pli ol unu miliono da loĝantoj, do esperantistoj vere malmultas. Sed ni devas esti dankemaj al ĉeforganizanto Toni Hirsik, jam ne tre juna kun malmulte da helpantoj. Bedaŭrinde multe influas milito inter Rusio kaj Ukrainio, ĉar ekzemple Tartu, la urbo de ĉi-jara BET, situas nur tridek kilometrojn de limo kun Rusio. Antaŭ milito kutime partoprenis 400 - 500 homoj, ĉi-jare bedaŭrinde inter 30 - 50, ne alvenis eĉ unu homo el neeŭropaj landoj.

Kia estis la programo? Sinjoro Toni celis, ke partoprenantoj amuziĝu. Antaŭ tagmezo prelegoj, posttagmeze ankaŭ. Unu sinjorino prelegis pri sia partopreno en nepala kongreso kaj veturado tra preskaŭ tuta Nepalo. Germana esperantisto sciigis iom naivan opinion pri la milito inter Rusio kaj Ukrainio. Li estis el Bonn – la okcidenta parto de Germanio, kiu ne havis sperton kun rusa premo.

Vespere sinjoro Kale kaj liaj familianoj okupiĝis pri malnova estona muziko, li

klarigis kiel de antaŭ multaj jaroj estonoj kantas, dancas, montris al ni diversajn muzikilojn, kiuj aspektis iomete strange, sed muziko kaj dancoj estis vere belaj, iomete malrapidaj, ĉar en Estonio estas longaj vintroj, malagrablaj frostoj, estonoj devis ŝpari energion, danci kaj kanti malrapide.

Kion pri manĝoj? Ni devis mem zorgi pri manĝaĵoj, sed ne estis problemo. Miaopinie Estonio havas pli altan vivnivelon ol Ĉeĥio. Supermarktoj multas, vi povas aĉeti, kion vi volas. Nur prezoj estas pli altaj ol en Ĉeĥio.

Kion vi faris ekster la oficiala programo? Estis amuze paroli kun aliaj partoprenantoj. Ekzemple mi kunvenis kun mia amikino el Finnlando. Se ne estus venontjare UKo en Ĉeĥio, mi tutcerte veturus al BET en Litovio

Estonio tute ne havas montetojn, sed multe da arbaroj, malmulte da homoj. De tempo al tempo vi vidas vilaĝojn, du, tri malgrandajn dometojn, poste duonon da kilometro nenion, kaj poste denove du tri dometojn....

Kiel vi veturis al Estonio? Mi flugis al Talin kaj reen ankaŭ el Talin, riĉa historia urbo.

Kiel vi komunikis ekster la Esperanta evento? Estonaj junuloj jam ne kapablas komuniki ruslingve sed multaj bone parolas angle. Kun pli oldaj homoj eblas paroli ruse. – Onidire en Talin duono de loĝantoj estas rusoj. Surstrate ili parolas ruse inter si, sed preskaŭ ĉiuj eminente parolas ankaŭ estone.

Josef Kalčík

JUBILEANTOJ DE OKTOBRO, NOVEMBRO KAJ DECEMBRO 2024

Jarmila Kussá, Ostrava
Alois Kvapil, Zábřeh na Moravě
Marie Moučková, Koštov
Vlasta Pištíková, Praha
Vojtěch Tesař, Holýšov
Jindřich Tomíšek, Říkovice
František Vychodil, Ostrava
Josef Zajíček, Dubicko
Pavel Zmarzliak, Přerov-Předmostí
Jaroslava Malá, Čichtice

Jindřich Tomíšek - 85

Honora membro de ĈEA, aktivulo ferojista kaj de IKUE, klubano de Přerov **Jindřich Tomíšek** la 14-an de novembro 2024 atingis sian 85-jariĝon. Li verkis multajn artikolojn pri IFEF-kongresoj kaj dissendis informilojn *El fervoja mondo* kaj *Trajne por travivaĵoj*. Konata ankaŭ pro sia sporta aktivado, nome maratona kuro, en alta aĝo.

Aranĝoj de J. Drahotová



KŘEST PŘEKLADU KNIHY

Pohádkovou knihu pro děti od 6 let Kral Mates I. Reformátor napsal polský autor Janusz Korczak. Příběh o chlapci, který pašel a musel se stát králem, přeložil z esperanta do češtiny a vlastním nákladem vydala Jindřiška Drahotová. Vstupné zdarma, do naplnění kapacity.

ÚTERÝ 10. PROSINCE V 15:00

Komunitní centrum Klementina
TŘÍDA VÁCLAVA KLEMENTA 601, MLADÁ BOLESLAV

**MEZINÁRODNÍ JAZYK
ESPERANTO**

Chcete se v krátké době naučit základy nového jazyka a získat nové přátele? Vyzkoušejte esperanto. Čeká nás 12 setkání, začínáme 7. 1. 2025, poté každé úterý od 18 do 17 hodin.

Kurz vede Jindřiška Drahotová

- Kdo je esperantistický jazyk
- Novázní přístupy v ČR v zahraničí
- Poznávat země a kultury
- Uspadnutí studia dalších jazyků
- Přímá komunikace na bázi vzájemnosti
- Trénování paměti a prevence Alzheimerovy choroby

K Knihovna města
Mladá Boleslav

Přihlášení předem nutné v knihovně nebo na www.kmmb.cz

Rememoro

La 1-an de oktobro 1954 naskiĝis **Stanislava Chrdlová** (Stanjo), instruistino, kiu kunverkis lernolibron *Esperantem za tři měsíce, Baza ĉeĥa*



konversacio kaj Kantoj por ĝojo. Ŝi amis folkloron de Moravio, de kie ŝi originis. Ŝia vivo finiĝis en ŝia 46-a jaro!

Kondolencoj

Claude Gacond el Svislando



La 17-an de novembro 2024 forpasis Sinjoro Claude GACOND, honora membro de UEA, de ILEI kaj de Svisa Esperanto-Societo. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanto, kreante Kulturan Centron Esperantistan (KCE) kaj Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI).

Pavel Nechvíle

(1942-2024)

La 4-an de decembro 2024 forpasis **Pavel Nechvíle** (82-jara) el Pardubice. Li esperantistiĝis en 1987, laboris kiel sekretario de EK Pardubice. En 2007 li estis elektita kiel prezidanto de AEH, en 2009 li kun J. Rýznarová parolis en *Český rozhlas* (Ĉeĥa Radio), li ankaŭ esperantigis la retejon *Svatý Jan pod Skalou* (Sankta Ivan sub la Roko, bedaŭrinde en la retejo la traduko ne plu estas, sed la teksto konserviĝis) kaj kun J. Hron verkis broŝuron *Cent jaroj de Esperanto en Pardubice*. En la jaro 2020 li kunlaboris pri traduko de nova broŝuro pri nia urbo Pardubice.

Ni kondolencas

■ En aŭgusto 2024 mortis **Elmíra Škáchová** el Benešov, medicina doktorino, en aĝo de 96 jaroj.



■ La 1-an de novembro 2024 mortis **Božena Lorencová** el Prago en aĝo de preskaŭ 92 jaroj.



■ La 2-an de novembro 2024 forpasis **Miroslava Kovaříková** el Prago, en aĝo de 82 jaroj.

Josef Vítek-filo

(1952 – 2024)

Nia karmemora Josef Vítek-patro (1911-1983), la unua prezidanto de ĈEA, havis du filojn, Josef (*1952) kaj Václav (*1954), kiuj ambaŭ aktivis en junulara sekcio kaj en SET Lančov en la 1970-aj jaroj. Poste venis universitataj studoj, familia vivo – kaj nur post jaroj ili aperadis dum la renkontiĝoj de eksaj tendaranoj en Lančov. La 6-an de oktobro 2024 Václav sciigis, ke lia frato Josef matene forpasis.



Josef Vítek en Lančov 2018

István Nemere

(1944 – 2024)

La 15-an de novembro 2024 unu semajnon post sia 80-jariĝo forpasis fama hungara verkisto de scienc-fikciaj verkoj **István Nemere**. Dudekon el siaj 800 libroj **li verkis originale en Esperanto**.

Kiam en la jaro 2012 en Svitavy okazis OSIEK-konferenco kun temo *Scienc-fikcio kaj robotoj*, István Nemere partoprenis kaj prelegis pri sia romano Terra.



Li rakontis pri tio, kiel en la futuro ŝanĝiĝos la pensado de homoj, por kiuj estos tute normale, ke ili vivos kaj laboros ie ekster la Tero en la universo. Ke estas

eble, ke nia universo jam multfoje ŝrumpiĝis kaj denove praeksplodis aŭ ke en la Universo ekzistas sennombraj tiaj universoj, kia estas la nia. Povas eĉ okazi, ke la homoj forlasos siajn korpojn kaj konservos sian inteligenton en alia formo kaj disvastiĝos tra kosmo. Eble ni ne povas pli inteligentajn estaĵojn trovi, ĉar ili en spirita formo forlasis nian Universon kaj vivas en alia dimensio. Laŭ alia teorio ie en la kosmo ĝermas la vivo kaj astroj ĝin distribuas tra la universo kiel semojn kaj sur nia planedo unu semo ekĝermis kaj fondis vivon.

Verkoj verkitaj en Esperanto: La naŭa kanalo, La fermita urbo, La blinda birdo, Sur kampo granita, Febro, La monto, La alta akvo, Serĉu mian songon, Terra, Dum vi estis kun ni, Vivi estas danĝere, Vi povas morti nur dufoje, Pigre pasas la nokto, Krokize de mia gardeno, Nesto de viperoj, Amparolo, Serĉu, kaj vi trovos, Vizito sur la teron, Krias la silento, Vismar, Jesa, Serpentoj en la puto, Ruza, kiel vulpo.

mm

Stanislav Krajíček (1956-2024)

La 29-an de septembro 2024 subite kaj neatendite forpasis en aĝo de 68 jaroj praga esperantisto kaj pentristo Stanislav Krajíček. En Esperantujo li konatas sub la arta alinomo PANO (ĉar lia familia nomo signifas en la ĉeĥa lingvo „pantranĉaĵeto“).

Li naskiĝis la 29-an de julio 1956 en orienta Moravio en la komunumo Klečůvka (regiono Zlín). Li kreskis en granda familio kun 7 gefratoj.

En la 1980-aj jaroj li eklernis Esperanton en la klubo en Zlín. En 1990 li transloĝiĝis al Prago, kie li pasigis la reston de sia vivo.

Inklinon kaj talenton por arto kaj pentrado li havis jam ekde infanaĝo. Pro praktikaj kialoj li origine lernis profesion farbisto-lakisto. En Prago li ekstudis desegnadon ĉe akademia pentristo Zdeněk Šorf kaj tutvive plu memstudis kaj kleriĝadis pri arto kaj pentroartaj teknikoj. Memstare li evoluigis sian originalan stilon, kiu havis en diversaj vivperiodoj diferencajn aspektojn.

Li havis viglan fantazon kaj malfermitecon por eksperimentado pri koloroj kaj pri uzataj materialoj (ekz. ligno aŭ tekstilaĵoj).

En pluraj siaj verkoj li esprimis sian intereson pri mitoj, misteroj kaj spiritaj aspektoj de la vivo. Dum sia vivo li kreis estimindajn pli ol 1200 artaĵojn.

Stanislav Krajíček estis prezentita dum diversaj komunaj artekspozicioj, precipe en Prago kaj Centra Bohemio, kaj havis tridekon da memstaraj ekspozicioj ne nur en Prago, sed ankaŭ en la muzeoj Beroun kaj Roztoky, en Veltrusy, Zlín

k.a., entute en 60 diversaj lokoj de Ĉeĥio.

Sian fakan lertecon li utilis i.a. kiel kulisopentristo en Filma Artakademio.

En Esperantujo en 1998 li estis unu el la kunfondintoj kaj aktivaj membroj de la praga klubo E-mental', kiu apartenas sendube al la plej aĝemaj eĉ internaciskale. Li partoprenis ofte la klubajn aranĝojn kaj ekskursojn (ne nur enlande, sed i.a. en Slovakio kaj Italio).

En la Esperanto-Muzeo en Svitavy en decembro 2011 li prelegis pri sia persona pilgrimado al Santiago-de-Kompostelo kaj en 2013/2014 prezentis tie siajn verkojn dum la ekspozicio *Esperanto kaj muzoj*.



En 2014 li grave meritis pri renovigo de la Esperanto-monumento antaŭ la Kongresa Centro en Prago (la okazloko de la 81-a UKo en 1996).

Dum la menciita kongreso li ankaŭ ekspoziciis siajn pentraĵojn. Sekve de tio okazis danke al kunlaboro kun esperantistoj ankaŭ lia ekspozicio en Francio (Cup St Tropez).

Stanislav Krajíček havis Esperantan familion. Lia edzino Květa Krajíčková (fraŭlinnome Hubnová) en la 1990-aj jaroj estis prezidantino de E-Klubo en Prago kaj agis en la estraro de ĈEA. La filino Zuzana ankaŭ parolas Esperanton.

Stáník sendube mankos al multaj el ni.

Pavla Dvořáková

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
06946 konference/sjezd ČES
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1480,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 870,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1500,- Kč (*1000,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
55. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz**

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2025

-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 55-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 1.2.2025**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz).

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj
de E-Klubo en Brno (Esperantobrna.cz).
Gastoj bonvenas!

2025

2025-04-05 Sabla Printempo

2025-07-19-26 KELI-kongreso en Pardubice

2025-07-19-26 IKUE-kongreso en Brno

2025-07-26/08-02 UNIVERSALA

KONGRESO DE ESPERANTO EN BRNO

<https://www.esperanto.cz/eo/aktuality>

2025-08 Fervojista renkonto en Hranice

2025-09-06 Fervojista renkonto en Choceň

2025-10 Fervojista konferenco en Ramzová

2025-10-17/19 ĈEA-kongreso en Havířov

Elektio de gravaj aranĝoj eksterlande

2025-03-15/22 Mediteranea Esperanto-semajno

Info: <https://esperanto-provence.org>

2025-04-30/05-04 74-a IFEF-kongreso Žilina

2025-07-05/13 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en
Kaunas, Litovio

2025-07-19-26 IJK en Indonezio



Fervojistoj en Kořenov
fotis A. Abelovská



Petro Chrdle dum prelego en KAEST Žilina



Aŭtuna E-mentala feriado en Kalabrio



Eŭropa tago de lingvoj en Prago



Ĝuu Esperanton en la muzeo de J. A. Komenio en Přerov



Nova klubejo de la Praga klubo,
Revoluční str. n-ro 5
Ekspozicieto de fotoj el Aruŝa
faritaj de Evgen Kovtonyuk



Fervojistoj konferencis en Kořenov